

La nuna stato de la lingvoplaniko

Jonathan Pool

Department of Political Science, DO-30
University of Washington
Seattle, Washington 98195, Usono*

Prelego ĉe la Konferenco pri Esperantologio, Rotterdam, 29 julio 1988

Skizo:

1. La objektoj de la lingvoplaniko.
2. La metodoj de la lingvoplaniko.
3. La rezultoj de la lingvoplaniko.
4. La literaturo de la lingvoplaniko.
5. La organizaro de la lingvoplaniko.
6. La bezonoj de la lingvoplaniko.

1. La objektoj de la lingvoplaniko.

La lingvoplaniko estas la scienco pri la lingvoplanado. La lingvoplanado estas la agado, cele efiki lingvajn kondiĉojn.

Lingvoplaniko =
scienco pri lingvoplanado.

Lingvoplanado =
cele efiki lingvajn kondiĉojn.

Se agado ne estas cela, ĝi ne estas planado. Se ĝi ne efikas ion, ĝi ne estas planado. Se ĝi efikas nenion lingvan, ĝi povas esti planado sed ne lingvoplanado. Lingvoplanado devas efiki lingvajn kondiĉojn sed ne necese lingvojn mem. Ekzemploj de lingvaj kondiĉoj estas la nombro da scipovantoj aŭ uzantoj de lingvo, la prestiĝo de lingvo, la oficialeco de lingvo ĉe interŝtata organizo, la genreco de profesiaj

substantivoj ĉe lingvo, kaj la nombro da lingvoj instruataj en la lernejoj de lando.

Laŭ iuj lingvoplanikistoj, agado ne estas lingvoplanado se ĝia faranto ne estas registaro. Laŭ aliaj lingvoplanikistoj, ne nur registaroj sed iu ajn povas, principe, lingvoplani. Mi akceptas tiun pli larĝan signifon de la vorto.

Lingvoplanikistoj esploras la sukceson aŭ malsukceson de lingvoplanado. Ili demandas:

Kies	} lingvoplanado sukcesas?
Kia	
Kioma	
Kiel	
Kiam	
Kie	
Kial	

Ekzemploj de la demandoj estas:

Kies: Ĉu akademioj sukcesas uzigi la terminojn kiujn ili oficialigas?

Kia: Ĉu intensivaj lingvokursoj funkcias pli bone ol malintensivaj?

Kioma: Ĉu oni povas ne nur aliigi sed ankaŭ inventi lingvojn?

Kiel: Ĉu simbola, ĉu praktika, argumentado pli efike igas homojn lerni oficialan lingvon?

Kiam: Ĉu la povoj de lingvonormistoj pliiĝas kiam komunik teknikaj inventoj malplikostigas la forkomunikadon?

Kie: Ĉu la politiko franclingvi la komercan vivon en Kebekio sukcesis?

Kial: Ĉu per gramatika inercio oni povas kompreni la malsukceson de la klopodoj senseksismigi la pronomojn de la angla lingvo?

2. La metodoj de la lingvoplaniko.

La lingvoplaniko ne havas fortan metodan tradicion. Ĝiaj istoj lernis diversajn esplormetodojn studante diversajn fakojn, pleje fakojn aliajn ol la lingvoplanikon. La metodo plej ofte uzata estas nesistemeca kondukt-observado. La observata konduto ofte estas lingvuzado; la atestaĵoj pri tiu konduto ofte estas diraĵoj kaj skribaĵoj. Per granda plejmulto, la artikoloj lingvoplanikaj prias po 1 landon. La kutima titolo de artikolo aspektas kiel

“Lingva [fenomeno] en [lando]”

Evidente, la rezultoj de tiaj esploroj malofte ĝeneralas. Kiam oni volas uzi grandajn faktarojn por esplori la lingvoplanadon, oni iam kolektas la faktojn per sistemecaj demandaraj, tekstfiltraj, aŭ observadaj metodoj, kaj analizas la faktojn per sistemecaj statistikaj metodoj. Tiam, tamen, oni ofte prezentas centojn da faktoj sen klara teoria profito.

Por kolekti interesajn faktojn per utilaj metodoj, oni devas decidi kio estas la gravaj demandoj kaj kiuj ideoj pri la respondoj estas provindaj. Sistemecigitaj ideoj nomiĝas modeloj; tradicio de modelado nomiĝas teorio. La lingvoplaniko, kun sia malforta metoda tradicio, havas ankaŭ malfortan modeladan tradicion. Do, la lingvoplanika teorio ujas multajn konjektojn kaj sugestojn, sed malmultajn pruvojn. Oni ne facile povas atribui tiun econ al la objekto de la lingvoplaniko. La teorioj de la homa lingva kapablo, de la komunikado, de la decidado, de la planado, kaj de la politiko ujas tre evoluintajn modelojn. Mi emas konkludi ke la malmulta sistemeco de la teoria laboro ĉe la lingvoplaniko rezultis de historiaj kaŭzoj sed ne nepre ĉiamos.

3. La rezultoj de la lingvoplaniko.

Mi ĵus diris ke la rezultoj da la lingvoplaniko estas pleje konjektaj kaj sugestaj, ne pruvitaj. Sed konjektoj pli bonas ol pura nescio. Ekzistas kelkaj konjektoj en la lingvoplanika literaturo pri la ekzemplaj demandoj kiujn mi donis. Laŭ la plej oftaj ekspertaj opinioj, akademioj ne sukcesas uzigi la terminojn kiujn ili oficialigas. Intensivaj lingvokursoj ja funkcias pli bone ol malintensivaj. Simbola argumentado pli efike igas homojn lerni oficialan lingvon ol praktika argumentado. La politiko franclingvigi la komercan vivon en Kebekio almenaŭ parte sukcesis. Per gramatika inercio oni ja povas kompreni la malsukceson de la klopodoj senseksismigi la pronomojn de la angla lingvo.

Sed la plej gravaj ecoj de la rezultoj en la literaturo de la lingvoplaniko estas ilia modesteco kaj ilia provizoreco. Do, ni scias multajn faktojn pri unopaj lingvoplanaj eventoj, sed malmultajn leĝojn pri la kaŭzaj rilatoj inter tiaj eventoj. Mi citu 1 ekzemplon. Einar Haugen, grava lingvoplanikisto, skribis en 1983,

“Mia opinio ... (kiun neus ... aliaj) est[a]s ke socia maljusteco povas speguliĝi ĉe lingvo, sed nek rezultas de lingvo nek spertas profundan influon de lingvaj ŝanĝiĝoj.”

Kiel Haugen konfesas, oni batalas ankoraŭ pri baza sed malklare formulita demando: la kaŭza direkto inter lingvo kaj socio:

Lingvo ↔ socio

Do, se batalanto por iu socia revolucio demandus ĉu indas uzi lingvoplanajn ilojn por por tiun revolucion, lingvoplanikisto devus doni sian opinion kaj ankaŭ diri ke aliaj lingvoplanikistoj havas la malan opinion. Kaj por la diversaj opinioj oni povus doni preskaŭ nur ekzemplojn kiel atestaĵojn. Supozu ke post 5 minutoj la ministro pri edukado de Tunizio envenos ĉi-tiun ĉambron kun 10 stabanoj kaj 100 volumoj de statistikaj informoj pri tiu lando. Li intencas informi min pri siaj celoj kaj sekve demandi al mi kiujn lingvojn Tunizio tiucelare instruu en siaj lernejoj, kiuvice, per kiuj metodoj, al kiuj lernantoj, dum kiomaj jaroj, ekde kiu aĝo. Eĉ se mi havus ĉi-podie la 100 plej utilajn librojn lingvoplanikajn kaj sufiĉan tempon por serĉi ion ajn en tiuj libroj, mi apenaŭ povus ekrespondi tiujn demandojn. Ĉu mia malpovo estus rezulto de iu esenca eco de la lingvoplanado? Mi dubas tion. Mi kredas ke la plua progreso de la lingvoplaniko povigos ĝiajn ekspertojn respondi tiajn demandojn multe pli bone ol ili nun povas.

4. La literaturo de la lingvoplaniko.

Malgraŭ la mankoj de la ĝisnuna lingvoplanika laboro, ekzistas leginda tiufaka literaturo. Laŭ mia juĝo la 5 plej utilaj scilingvoj por la legado nun estas la angla, la franca, la rusa, la germana, kaj Esperanto, laŭ tiu vico. Tamen, miaj memaj scilingvoj kaj interesoj certe influis mian literaturan konon, do mi ne asertas la objektivecon de tiu lingvolisto. Se vi neniam legintus verkon lingvoplanikan, mi rekomendus ke vi serĉu ion interesan en la jenaj libroj (mi indikas nur la unuan verkinton aŭ redaktington) kaj en najbaraj libroj sur la bibliotekaj bretoj:

Beer, W. *Language Policy and National Unity*

Белодед, И. Научно-техническая революция и функционирование языков мира

Blair, R. *Innovative approaches to language teaching*

Blanke, D. *Internationale Plansprachen*

Cobarrubias, J. *Progress in Language Planning*

Duc Goninaz, M. *Lingvoj, Gentoj kaj Lingva Politiko*

Edwards, J. *Linguistic Minorities, Policies and Pluralism*

Fishman, J. *Advances in Language Planning*

Fishman, J. *The spread of English*

Губогло, М. Современные этноязыковые процессы в СССР

Hartig, M. *Angewandte Soziolinguistik*

- Kalverkämper, H. *Deutsch als Wissenschaftssprache*
- Kühlwein, W. *Neue Entwicklungen der angewandten Linguistik*
- Laponce, J. *Langue et territoire*
- Large, J. *The Foreign-Language Barrier*
- Lo Jacomo, F. *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'Espéranto*
- Lo Jacomo, F. *Plurilinguisme et communication*
- Martin, A. *L'État et la planification linguistique*
- O'Barr, W. *Language and Politics*
- Paulston, C. *Bilingual Education*
- Rubin, J. *Can Language Be Planned?*
- Rubin, J. *Language Planning Processes*
- Schubert, K. *Metataxis*
- Schwab, W. *Recueil des textes législatifs sur l'emploi des langues*

- Schweda-Nicholson, N. *Languages in the international perspective*
- Tabory, M. *Multilingualism in international law and institutions*
- Tauli, V. *Introduction to a Theory of Language Planning*
- Thorne, B. *Language, Gender and Society*
- Tonkin, H. *Overcoming language barriers*
- Vaillancourt, F. *Économie et langue*
- Verdoodt, A. *La protection des droits de l'homme dans les états plurilingues*
- Weinstein, B. *The Civic Tongue*
- Witkam, A. *Distributed language translation*
- Wolfson, N. *Language of inequality*

Mi rekomendus ke vi ankaŭ rigardu la lastajn volumojn de la ĉefaj revuoj lingvoplanikaj. Ili estas, laŭ mia opinio, la jenaj (mi vicigas la plej gravajn por tiu fako komence):

Language Problems and Language Planning
Language Planning Newsletter
International Journal of the Sociology of Language
Applied Linguistics
Revue de l'AILA/AILA Review
Language in Society
Fachsprache/Special Language

Pli detalan gvidilon pri la lingvoplanika literaturo vi povas trovi ĉe

T. Reese & J. Pool, "Guide to Information Resources in Language Planning", en C. M. Eastman, *Language Planning: An Introduction* (San Francisco: Chandler & Sharp, 1983), p. 241–253; antaŭa versio en *Language Planning Newsletter*, 5 (2, 1979), 1–3, 10–12.

5. La organizaro de la lingvoplaniko.

Ekzistas lingvoplanaj organizoj en multaj landoj, sed mi parolas pri organizoj lingvoplanikaj, ne lingvoplanaj. Strange, ne ekzistas tutmonda asocio de lingvoplanikistoj. La organizoj plej proksimaj al tio estas la jenaj:

“Language Planning Section” de la
 “Association internationale de
 linguistique appliquée” (“AILA”)
 “Research Committee on
 Sociolinguistics” de la
 “Association internationale de
 sociologie”

Esplorado lingvoplanika okazas ĉe diversaj sciencaj institutoj kaj universitatoj. Universitataj esploroj okazas en diversaj universitatoj, ekzemple tiuj pri la lingviko, la politiko, la sociiko, la ekonomiko, kaj diversaj unuopaj lingvoj, regionoj, kaj landoj. Neniu explorejo tre eminentas kompare kun ĉiuj aliaj. Se vi emas studi la lingvoplanikon, mi rekomendas ke vi trovu per la literaturo kelkajn esploristojn kies laboro imponas vin kaj kontaktu ilin rekte por ricevi iliajn konsilojn.

6. La bezonoj de la lingvoplaniko.

La lingvoplaniko estas juna scienco kaj jam klopodas respondi demandojn tre gravajn por la homara bonfarto. La postuloj tre plias ol la nunaj povoj de tiu scienco. Laŭ mia opinio, la lingvoplaniko bezonas pli seriozajn studentojn, modelistojn, teoriajn persistojn, kaj teorie direktatajn faktesploristojn.

La Esperantistaro estas natura fonto de novaj lingvoplanikistoj. Se vi ankoraŭ elektos vian profesion aŭ vian esplortemon, mi ja konsilas al vi konsideri la lingvoplanikon. Sed la bezonata sistemeco postulas ke la modelistoj ĝeneraligu la esploratan problemon, precizigu ĝian difinon, kaj atendigu konkludojn ĝis post zorga esploro. Esperantistoj ofte malkomfortas pro tia trakto. Ili emas specialigi la problemon, malklare difini ĝin, kaj anonci konkludojn eĉ antaŭ ia ajn esploro.

Por klare montri la eblajn konfliktojn inter la ordinara esperantista penskielo (kiu fakte estas ankaŭ la ordinara homa penskielo!) kaj la modelista penskielo, mi finas ĉi-tiun prelegon per ekzemplo. La ordinara esperantisto opinias ke la ĉefa problemo de Esperanto estas la problemo ekĉiesi. Homoj ne lernas ĝin ĉar aliaj homoj ankoraŭ ne lernis ĝin. Ĉiu atendas ke iu alia antaŭe agu. Se iel eblus igi ĉiun homon scipovi Esperanton, la lingva problemo solviĝus por ĉiam. Novnaskitoj trovas mondon en kiu la valoro de Esperantoscipovo grandegas. Do, malkiel nun, ili lernas ĝin volonte dum sia junaĝo. Tio pluigas la valoron de scipovo por la eĉ postaj novnaskitoj. Do la situacio estus stabila ekvilibro. La organizita esperantistaro klopodas movi la situacion for de la nuna ekvilibro, ĉe kiu nelernado kaŭzas nelernadon, al nova ekvilibro, ĉe kiu lernado kaŭzas lernadon.

Tiu skizo de la ordinarula opinio ŝajnas logika, sed ĝi povas esti logika nur se ĝi baziĝas sur klaraj supozoj. Mi difinu per kelkaj klaraj supozoj simplan ekzemplan modelon por esplori la verecon de la kutima konkludo. La analizo baziĝas sur laboro kun Reinhard Selten, Universität Bonn, FRG.

Supozu ke ekzistas en la mondo 3 *gentlingvoj* kaj 1 *planlingvo*. La distribuo de la homaro laŭ denaska lingvo jenu:

Distribuo de denaskuloj:

Gentlingvo 1	50%
Gentlingvo 2	35%
Gentlingvo 3	15%

Supozu, plu, ke ĉiu homo scipovas la planlingvon kaj neniu scipovas alian gentlingvon ol sian denaskan. Do, la eka distribuo de scipovantoj de la 4 lingvoj kiel onoj de la homaro estas:

Eka distribuo de scipovantoj:

Gentlingvo 1	50%
Gentlingvo 2	35%
Gentlingvo 3	15%
Planlingvo	100%

Supozu, plu, ke ĉiu lingvo krom la denaska lerneblas kontraŭ iu *lernkosto*. La lernkosto estu la oblaĵo de 2 kvantoj. 1 kvanto estu la *malfacileco* de la lernitaj lingvoj. La malfacileco de la planlingvo estu 0,6; la malfacileco de iu ajn gentlingvo estu 1,8, do la 3oblo de la planlingva malfacileco.

Malfacilecoj:

Gentlingvo 1	1,8
Gentlingvo 2	1,8
Gentlingvo 3	1,8
Planlingvo	0,6

La malfacileco de iu ajn aro de lingvoj estu la sumo de la malfacilecoj de la unuopaj lingvoj en la aro. La alia kvanto en la lernkosto estu la *lernrezisto* de la lernanto. Homoj tre lingvolertaj aŭ lingvemaj havas malgrandajn lernrezistojn. Lingve mallertaj aŭ malemaj homoj havas grandajn lernrezistojn. Supozu ke la lernrezistoj de la denaskuloj de ĉiu gentlingvo varias de 0 al 1, kun ebena distribuo inter tiuj finpunktoj. Do, kiom da homoj havas lernrezistojn malpli ol 0,5, tiom da homoj havas lernrezistojn pli ol 0,5. Por fiksi ies lernkoston, oni obligas la sumon de la malfacilecoj de la lingvoj kiujn tiu lernas per ties lernrezisto. Je la eko, ĉiu lernintus nur la planlingvon, kies malfacileco estas 0,6, do la suferitaj lernkostoĵoj varias inter 0 kaj 0,6.

Supozu, krome, ke onia *bonfarto* mezuriĝas per la ono de la homaro kun kiu oni povas *komuniki*. Kun ju pli da homoj oni povas komuniki, des pli bone oni fartas. Oni povas komuniki kun iu ajn kiu scipovas almenaŭ unu lingvon kiun ankaŭ oni scipovas. Je la eko, ĉiu scipovas la planlingvon, do ĉiu povas komuniki kun ĉiu alia. Tial, la bonfarto de ĉiu je la eko estas preskaŭ 1 (preskaŭ, ĉar kun si mem oni laŭ supozo ne komunikas).

Supozu, plu, ke onia *ĝojo* estas onia bonfarto minus la lernkosto kiun oni suferas. Je la eko, ĉies bonfarto estas 1 kaj la suferitaj lernkostoĵoj varias inter 0 kaj 0,6. Do la ĝojoj de la homoj varias inter 1 kaj 0,4. Ĉiu havas, tamen, pozitivan ĝojon.

Mi faras nun 1 pluan supozon. Ĉiun minuton, la sorto hazarde elektas 1 homon kaj demandas al li,

“Ĉu vi nun ĝojas almenaŭ tiom
kiom vi ĝojus se vi estus scipovanto
de iu ajn alia aro de nedenskaj
lingvoj?”

Se la respondo estas “Jes”, nenio ŝanĝiĝas. Se la respondo estas “Ne”, la elektita homo ŝanĝas sian aron de scipovataj nedenskaj lingvoj al tiu aro kiu plejigas lian ĝojon. Eble tiu lasta supozo ŝajnas absurda. Mi faras ĝin por imiti naturajn longtempajn procezojn. En la naturo, homoj devas suferadi kostojn por pluigi siajn fremdlingvajn scipovojn; alie ili malrapide forgesas la lernitajn lingvojn. Krome, en la naturo homoj mortas kaj filoj anstataŭas ilin. La filoj faras novajn lerndecidojn. La supozo pri la rajto ŝanĝi sian decidon estas ilo, en ĉi-tiu modelo, por imiti tiujn procezojn sen grandaj komplikaĵoj.

Farinte tiujn supozojn, mi difinis klaran situacion. Oni povas esplori ĝin por akiri definitivajn rezultojn. Antaŭe, tamen, pensu pri via intuicia konjekto. Kio devos okazi?


Eble nenio okazos, ĉar ja ĉiu jam havas pozitivan ĝojon. Kial oni ŝanĝu ĝojigan decidon lerni la planlingvon kaj nur la planlingvon?

Sed pensu pli logike. La modelo supozas ke eĉ ĝojuloj ŝanĝos siajn decidojn se ili povos per tio atingi plian ĝojon. Ĉu iuj homoj povus pliigi sian ĝojon per iu ŝanĝo? Jes. Denaskuloj de Gentlingvo 1, se ili mallernus la planlingvon, malaltigus sian bonfarton de 1 al 0,5, ĉar ili povus poste komuniki kun nur 2ono de la homaro. Sed inter ili estas iuj homoj kun grandaj lernrezistoj. La plej lernrezista suferis lernkoston je 0,6. Se li mallernus la planlingvon, lia bonfarto malpliĝus je 0,5, sed lia lernkosto malpliĝus je 0,6. Do lia ĝojo pliĝus je 0,1. Kiam la sorto elektos lin, li certe decidus mallerni la planlingvon. Same faros la aliaj anoj de tiu denaskularo kun lernrezistoj sufiĉe grandaj por igi tiun mallernon pliĝojiga.

Do, kelkaj anoj de la plej granda denaskularo mallernos la planlingvon, kaj poste la situacio stabiliĝos, ĉu ne? Ne. Ĉar nun iuj homoj estos nekomunikeblaj per la planlingvo. Se vi estus denaskulo de Gentlingvo 2 aŭ 3 kaj via lernrezisto estus tre malgranda, do ankaŭ viaj lernkosto estus tre malgrandaj, vi nun povus pliĝojigi se vi lernus Gentlingvon 1, ĉar per tio vi repovus komuniki kun la planlingvaj mallernintoj. Do, kiam la sorto elektos vin, vi decidus kromlerni Gentlingvon 1. Tio komplikigas la situacion.

Sed finfine ni ja atingos stabilan rezulton, ĉe kiu preskaŭ ĉiu scipovas la planlingvon kaj preskaŭ neniu lernas alian gentlingvon, ĉu ne? Nu, ni vidu. Mi funkciigis ĉi-tiun modelon ĉe mondo kun 200 homoj. Mi igis la sorton hazarde elekti homojn kaj igis la homojn

plejigi siajn ĝojojn ĝis la situacio stabiligis. La sorto devis elekti homojn pli ol 4000 fojojn por atingi stabilecon. Do, la homoj havis meze pli ol 20 okazojn por rekonsideri siajn decidojn. Kaj kio okazis? Jen la rezulto:



La stabila rezulto malaperigis la planlingvon! Ĝi havis 2 ekajn avantaĝojn: ĝi estis nur 3one tiom malfacila kiom gentlingvo, kaj ĝin scipovis jam la tuta homaro. Malgraŭ tiuj avantaĝoj, ĝi perdis iujn scipovantojn. Tiuj perdoj igis aliajn lerni gentlingvon. Tiu gentlingva lernado malplivalorigis planlingvan scipovon por ankoraŭ aliaj homoj, kaj tial ankoraŭ iuj decidis mallerni la planlingvon. Ĉies decido instigis, rekte aŭ nerekte, kontraŭplanlingvajn decidojn de aliaj. La kondiĉoj en la modelo kondukis al la tuta remalvenko de la planlingvo.

Tiu rezulto ilustras la valoron de logikaj modeloj. Ili pruvas al ni la eblecon de aferoj kies eblecon ni emas, eble pro la influo de esperoj, malkredi. Tiu modelo montras ke venkinta planlingvo povas poste remalvenki. Por esperantistoj, tiu ebleco devas esti tre grava. Ĝi montras ke ni eble bezonos ankaŭ lingvopolitikon postvenkan. Ĝi pensigas nin pri la demando, kia lingvopolitiko tio estu. Nenio rajtigas nin supozi ke venkoj estas nepre porĉiamaj, ankaŭ venkoj lingvaj, ankaŭ venkoj planlingvaj. Sed, sen logikaj modeloj, ni emas pensi tro malklare por kompreni tion. Ĉe iaj kondiĉoj, venkoj pluas. Ĉe aliaj kondiĉoj, venkoj maligās. La ĵus montrita modelo montris la rezultojn ĉe nur 1 ekzempla kondiĉaro. La serioza modelado uzas matematikajn metodojn por ĝeneraligi tiajn rezultojn al propozicioj pri la kondiĉoj de diversaj klasoj de kondutoj. La lingvoplaniko bezonas homojn kiuj volas kaj povas fari tian laboron.

*Ĉi-tiun laboron mi faris ĉe, kaj per apogo de, Zentrum für interdisziplinäre Forschung der Universität Bielefeld, FRG.